

Friedrich Wilhelm Weber,  
Dektritilio, ĉapitro 9, Sur arbaraj padoj

*tradukita de Manfred Retzlaff*

1 Gardi je urs-piedego  
povas sin la kapreolo,  
sed ne kontraŭ kato, kiu  
ĝin atakas je la kolo. -

2 Se vi iras tra arbaro,  
gardu vin sur vojoj viaj:  
Fiaj elfoj estas tie,  
nigraj homoj eĉ pli fiaj. -

3 Sovagej'! La laca suno  
kuŝas sur rokvandoj vastaj,  
por regali lastajn florojn  
per favoroj siaj lastaj.

4 Siblas tra la arbopintoj  
de l' fagaro, la trankvila,  
de l' kolombo, la sovaĝa,  
kurta, klaka bat' flugila.

5 Pego hakas, fore sonas  
de l' monedoj la kriĉado;  
kaj jen, kvazaŭ monto spirus,  
longa, peza suspirado.

...

6 Zumas nur abeloj cirkaŭ  
genciano kaj serpilo,  
krias akcipitro ie,  
ree muto kaj trankvilo. -

7 Gardu vin, Elmar'! - Li iris  
malrapide tra l' ravinoj,  
kie for de l' homoj kunen  
venas cervoj kaj cervinoj.

8 Ĉu li volis sekvi beston,  
pro plezuro ĝin mortigi?  
Ho, li volis en sanktejo  
preĝi kaj sin senpekigi. -

9 Venis li al senarbejo  
verda jen en la arbaro,  
kaj sur tiu staris meze  
ega kverko de Donaro.<sup>3</sup>

10 Larĝe kiel templa halo  
volbis sin branĉaro ĝia,  
sanktigita, ne lezita  
de hakil' au klingo ia.

11 Lau saga' kaj patra kredo  
estis ĝi propraj' de dio,  
susuranta kaj en trunko  
kaj en branĉo kaj folio.

...

---

<sup>3</sup>Tio estas kverko konsekrita al la dio Donaro.

12 Tien iris nun Elmaro,  
senarmile, manligite;  
propravole mallibera  
supren li sin turnis rite.

13 Staris kun klinita kapo  
li en la sanktejo dia,  
diris li: „Tro longe venis  
mi ne plu al servo via.

14 Ho, mi aŭdas, ke kolero  
via tremas tra l' folioj!  
Se malamas min teruloj,  
min favoru, bonaj dioj!

15 Se en la arbaron iris,  
knab', de birda kant' logita,  
lin insultas, sed ne longe,  
la patrino affiktita.

16 Vi koleru, sed ne troe,  
venas mi kun vunda koro;  
ĉar purigas pentemulon  
ja la fluo de la ploro.

17 Ho, vi Eternulo, kiun  
serĉas mi el tuta koro,  
kiu vi la sunon regas  
kaj homsortojn kun favoro;

...

18 kiu vi al mi proksime  
flustras ion arbopinte,  
kies sencon tamen mi ja  
ne komprenas, gin aŭdinte;

19 ĉu Votano, ĉu Donaro  
estas via nom', ho Dio?  
Estas vi nekkonita,  
unusola, same ĉio!

20 Tie ĉi sur konsekrita  
grundo mi al vi oferas  
ĉion, kion mi sopiras,  
ĉion, kion mi esperas!

21 Mi rezignas pri feliĉo,  
dezirante vian gracon;  
mi fordonas la sopiron,  
donu vi al mi nur pacon!

22 Volas mi abnegacii!<sup>4</sup> -  
Jen rompiĝas la silento!  
Jen kraket' kaj kordosiblo  
kiel siblo de serpento!

23 Sanceliĝis jen Elmaro,  
sag' en lia brust' fiksiĝis,  
tiun elŝirinte salte  
en densejon li eniĝis.

...

24 Fuĝo kaj rapida sekvo!  
Kaptis lin Elmar': „Murdisto!“  
- kriis li - „Vi maliculo!  
Vi, de l' rego mesaĝisto?

25 Kiam mi al malfermita  
vokis vin batal-defio,  
vi fanfaronul' retiris  
vin post via komisio!

26 Sed feliĉe! Malhonorus  
mian glavon sango via!  
De servisto strangolite  
mortu ja kanajlo tia!

27 Vi ne tremu! Mi ne tuŝos  
vin, samkiel oni restas  
for de iu, kiu de la  
pesto infektita estas.

28 Ĉu ne aĉetebliis iu?  
Ĉu ne trovis vi friponon,  
ke al vi vi propramane  
malhonoris la blazonon?

28 Mute lin rigardis tiu,  
furioze kaj timide;  
glitis suben lia arko,  
staris ili vid-al-vid.

...

30 Balbutante vokis Gero:  
 „Antau tribunalon venos  
 vi! Mi tie vin akuzos!“  
 Jen Elmar': „Mi gin eltenos!“ -

31 „Se vi min ofendos, tiam <sup>4</sup>  
 neniigos proskripcio  
 reĝa vin, ĉar ni potencas!“  
 Jen Elmaro: „Juĝos dio!

32 Kuru for!“ - La Frank' forfuĝis  
 kun malben' tra l' arbustaro;  
 de l' sovaĝa kato krio  
 raŭke sonis el fagaro.

*Traduko de la Germana poemo “Dreizehnlinden, Kapitel 9, Auf Waldes Pfaden” de FRIEDRICH WILHELM WEBER (Frederiko Vilhelmo Vebero, \*1813-12-25 – †1894-04.05) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04).*

*Arg-582-1174 (2012-04-26 10:40:44)*

---

4

„Se vi lezos min, vin reĝa  
 neniigos proskripcio;  
 la potenco estas nia!“  
 Jen Elmaro: „Juĝos dio!“